# Serio i e l e kantebla

Numero 1:

*Stelo*

Kiel, kiel, kiele
stelo pasas ĉiele?
Mi ne scias, kiele…
Ĝi ja pasas iele.

Kiel, kiel, kiele
stelo pasas ĉiele?
Mi ne scias, kiel ĝi…
pasas – eble tiel ĉi..



Numero 2:

*Estroj subastre*

Kiel kiel kiele
suno pasas ĉiele?
Ĝi ja pasas iele:
ĉiel pasas ĉiele.

Stelo, suno se pasas
dise-mise mi frazas:
Kiel pasas vi, astroj
diru al mi vi, estroj.

Numero 3:

*Kozoj*

Suno, steloj se pasas
mi mismise refrazas:
kiel pasas vi estroj,
diru al mi vi, astroj.

Kiel pasas la pensoj,
pri la entoj, eventoj,
pri okazoj, pri kozoj,
pri oazaj ripozoj…

pri la kozoj kaj pozoj,
pri la kaŭzoj, supozoj,
pri la vero kaj veroj,
pri la veraj aferoj?

Numero 4:

***Ismoj***

Kiel, kiel kiele
pasas pensoj? Ĉiele
pasas ili tra – ismoj,
kosmo kaj tra abismoj

.

